

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE ILEI
Madrido

La 23-a de julio 2018

Enkadre de la laboro de la 51-a Kongreso de ILEI
(unua kunsido, 1h.40min.)

La Kvorumo konsistas el triono de la voĉdonrajtaj komitatanoj kaj prezentas 23 voĉojn.

Partoprenintoj:

Estraro:

Mireille Grosjean, CH,	Prezidanto
William Harris (Vilĉjo), US,	Estrarano pri financoj
Elena Nadikova, RU,	Sekretario

Komitatanoj, reprezentantoj de laborkomisionoj, partneroj:

Jérémie Sabiyumva – BI	Magdalena Tatara – PL
Marc Cuffez – BE	Han Sugheui – KR
Rob Moerbeek – NL	Li Hyonsuk – KR
Mihai Trifoi - RO	Karina Oliveira – BR
Yuriko Ueno – JP	Juan Diego Díaz Bautista – ES
Duncan Charters - USA	Rubén Fernández Asensio – CAT
Enrique Ellemberg – USA	Marija Belosević - HR
Gustav Neumair – DE	Stefan MacGill – HU
Marija Jerković – HR	Didier Janot – FR
Aristophio Andrade Alves Filho - BR	Aurora Bute – RO
Robert Kamiński – PL	Karine Arakeljan - AM
Elena Nadikova – RU	Unika - KR
Vilĉjo Harris – USA	Mireille Grosjean – CH
Katalin Kovats - NL	Luna - KR

1. La kunsidon gvidis Prezidanto de ILEI Mireille Grosjean

Post kontrolo de la nombro de ĉeestantaj kaj anstataŭigitaj komitatanoj estis konstatita kvorumo:
la nombro de voĉdonantoj estas 28.

La komitatanon NTAHONSIGAYE Hassani anstataŭis SABIYUMVA Jérémie, Burundo.

La komitatanon Zsofia KORODY anstataŭis Gustav NEŬMAIR, Germanio.

La komitatanon Charles RODUIT anstataŭis Mireille GROSJEAN, Svislando. Ŝi havis 2 voĉojn.

La komitatanon Ron GLOSSOP anstataŭis Enrike ELLEMBERG, Usono

2. Estis akceptita decido pri la voĉdonado (unuanime: por - 28):

maksimume 3 voĉoj por unu persono.

3. Estis elektitaj protokolantoj: Jérémie Sabiyumva kaj Karine Arakeljan.

4. Estis elektitaj voĉdonnombroj: Katalin Kováts kaj Indu Tapaliya “Luna”.

5. Dumkonferencaj komisionoj – nedecidite

6. Aprobo de la Protokolo de la komitatkunsidoj en Busan (la decido ne estis farita pli frue pro la malsukceso de la reta voĉdonado). La Protokolo estis akceptita je 6 sindetenoj.

Por – 22

Sindetenoj -6

7. Du proponoj faritaj flanke de Katalin Kováts:

- Lernolibroj kaj etikaj demandoj
- Publikigo de la listo de literaturaĵoj

Ŝi proponis plifaciligi la alireblecon al instrumaterialoj por pligrandigi la nombron de homoj, kiuj povus profiti de tiuj materialoj. Necesas ankaŭ pliaktivigi la propagandon de instrumaterialoj, sciigi homojn pri la novaĵoj.

8. Maria Belošević parolis pri la diplomitoj, proponis prepari la precizan liston de homoj kun diplomoj. Mireille Grosjean informas, ke la diplomoj restas validaj dum nelimigita tempo.
9. Aprobo de la budĝeto por la jaro 2018 (la reta voĉdonado ne sukcesis).
Estis anoncita defcito kreita pro la kurantaj mastrumadaj laboroj.
La budĝeto estis akceptita je 4 sindetenoj.
Por – 24
Sindetenoj -4
10. Estis starigita demando pri reaktivigo de la komitatanoj kaj proponitaj du laborgrupoj. Estis ankaŭ pridiskutitaj la demandoj pri laboro de ILEI budoj/deĵorantoj dum la Universalaj Kongresoj kaj pligrandigo de la nombro de komisiitoj ĝis ses personoj (dume estas tri komisiitoj).
11. Anonco de Honoraj membroj.
Estis jenaj proponoj: Ronald Glossop, Duncan Charters (ambaŭ el Usono) kaj Germain Pirlot (Belgio).
Ronald Glossop kaj Duncan Charters estis anoncitaj honoraj membroj kaj akceptitaj kun aplaŭdoj.
12. Novaj sekcioj
ILEI havas 41 sekciojn. Aliĝis du novaj sekcioj – en Senegalo kaj Armenio. La kotizoj estas pagitaj. En Senegalo okazis instruista trejnado.
La rezultoj de voĉdonado estas jenaj:
La sekcio en Armenio (5 membroj) – akceptita unuanime (por - 28);
La sekcio en Senegalo (6 membroj) – akceptita je unu sindeteno. (por – 27, sindetenoj - 1)
La nombro de landaj sekcioj de ILEI iĝis 43.
13. La jara raporto
La Sekretario de ILEI prezentis la raporton por la jaro 2017. La Sekretario petis, ke la sekcioj pli aktive sendu siajn raportojn (almenaŭ 4 raportojn dumjare) por reflekti sian laboron en la ĝenerala raporto.
La raporto estis akceptita je 2 sindetenoj.
Por – 26
Sindetenoj -2
14. La Financa raporto por 2017.
Parolis William Harris (Vilĉjo), Estrarano pri financoj, kaj Katalin Kováts. Estis pridiskutitaj la elspezoj koncerne eldonadon kaj sendadon de la revuoj kaj ankaŭ la defcito ligita kun la kongresa lando. Kvankam la IPR (Internacia Pedagogia Revuo) malgrandiĝis laŭ dimensioj, tamen tio ne multe influis la elspezojn.
La financa raporto estis akceptita je 4 sindetenoj.
Por – 24
Sindetenoj -4
15. La laboro de la Ligo. Estis pridiskutitaj tri laborkampoj:
 1. Ĉiutaga laboro
 - Mastrumado de la Ligo,
 - La revuoj IPR kaj Juna Amiko (JA),
 - Kongresaj aferoj
 - La retejo
 - Eksteraj rilatoj, ktp
 2. Survojaj laboroj
 - La reta versio de la revuoj por blinduloj ,
 - La nova eldono de la Manlibro pri Instruado de EO
 - Kandidatiĝo por UNESCO
 - Arkivoj de ILEI (Herzberg)
 - La retejo por Esperanto-Centroj (biblioteko, litoj, ktp.)
 - La ISO kodo por Esperanto
 - Eo-kursoj por rifuĝintoj (UNHCR)
 - La Poŝamiko

- Kuracistoj sen limoj

3. Projektoj

- La nomo de ILEI en diversaj lingvoj
- Tutplena renovigo de la retejo.

16. Estis prezentita aliĝpeto de Nederlanda sekcio pri kunlaboro kun UNESKO. Mireille Grosjean klarigis, ke UN kaj UNESKO kunlaboras kun ŝtatoj, kaj ILEI ne estas NRO. Sekve, la kunlaboro povas okazi nur pere de UEA. La Komitato taskigis Mireille Grosjean transdoni la peton al UEA kaj proponi, ke UEA prenu sur sin la respondecon iĝi peranto en tiu ĉi afero.

17. Estis ankaŭ pridiskutitaj diversaj demandoj:

- Enketoj al membroj de ILEI
- Preparo de videofilmo kaj ĝia prezento al membroj
- Reto de lernejoj, kie oni instruas Esperanton
- Listo de membroj
- Mapo
- Membrokartoj aŭ identigilo (livero de prototipo de nomkarto).

La 24-a de julio 2018 (dua kunsido)

1. Katalin Kováts parolis pri la projekto Eo Instruista Trajnado (EIT) kaj la kialoj de ĝia malsukceso. Mireille Grosjean esprimis bedaŭron pri malmultaj aliĝoj kaj pri tio, ke la aliĝintoj ne finis la retan kurson.

Estis anoncitaj la okazontaj kursoj de Katalin Kováts, prezentitaj la stato de EIT kaj kunlaboro inter UNED (madrida universitato kun necheesta instruado) kaj ILEI.

2. Estis kalkulita la kvoromo: la nombro de la voĉdonrajtaj komitatanoj - 70, Kvoromo estas - 29, iom poste - 30, kaj poste - 27 ĉeestantoj.

3. Estis proponite elekti 3-kapan grupon, kiu subtenu la Elektan Komisionon por kontroli la elektoprocedon kaj kalkuli la voĉojn.

La elektitaj membroj de la Komisiono: Rob Moerbeek, Marc Cuffez kaj Katalin Kováts.

Proceduroj por elekto de la estraro (29 validaj voĉoj):

- Estis proponite havi Estraron el 7 personoj.

La propono estis aprobita:

Por - 28

Sindetenoj -1

5 estraranoj rekandidatiĝas kaj 2 novaj kandidatoj estas proponitaj.

- Okazis voĉdono por la 3-jara mandato:

Por - 28

Sindetenoj -1

- Elekto de Prezidanto

- Estis prezentita la kandidato por prezidanteco Mireille Grosjean por rekandidatiĝo por la 3-a mandato; por - 28; sindeteno -1 (Mireille Grosjean mem). La rekandidatiĝo estas akceptita.

-

Aurora Bute tralegis la sinprezenton de la kandidato por Prezidanto - Mireille Grosjean.

Demandoj: Rob Moerbeek - pri la posteulo

Katalin Kováts - pri IPR/JA

Mihai Trifoi - pri kontaktoj kun universitato

Estis demandoj pri la projekto rilate al interŝanĝo de instruistoj/lernantoj.

Okazis voĉdono por la Prezidanto de la Ligo, kaj Mireille Grosjean estis reelektita:

Por - 28

Sindetenoj -1 (Mireille Grosjean mem)

- Elekto de Sekretario.

Estis tralegita sinprezentado de la kandidato Elena Nadikova.

Okazis voĉdono por la Sekretario de la Ligo, kaj Elena Nadikova estis elektita:

Por - 28

Sindetenoj -1

- Elekto de la Estrarano pri Financoj.

William Harris (Vilĉjo) rekandidatiĝas por pli ol du mandatoj. La rekandidatiĝo estis akceptita:

Por – 28

Sindetenoj -1

Demandoj al la kandidato:

Rob Moerbeek – Ĉu la rezervo en la kaso estas disponigata?

Mihai Trifoi – Kio okazis al la fonduso pri infanaj kongresoj?

Okazis voĉdono por la Estrarano pri Financoj, kaj William Harris estis elektita:

Por – 28

Sindetenoj -1

- Elekto de aliaj 4 estraranoj

Estis prezentita la kandidato por Estrarano pri kongresoj de ILEI Radojica Petrović por rekandidatiĝo por pli ol du mandatoj; li ne ĉeestis pro la malsano. La propono estis akceptita:

Por – 26

Kontraŭ- 1

Sindetenoj -2

La rezultoj de la voĉdonado por la 4 kandidatoj je 30 validaj voĉoj estis jenaj:

Karine Arakeljan

Por – 27

Sindetenoj – 3

Ivan Colling

Por – 29

Sindetenoj – 1

Radojica Petrović

Por – 25

Kontraŭ- 4

Sindetenoj -1

Jung Yuro "Unika"

Por – 23

Kontraŭ - 1

Sindetenoj - 6

Ĉiuj 4 kandidatoj estis elektitaj.

- Elekto de la Kontrola Komisiono

Okazis voĉdono por 2 membroj de la Komisiono – Simon Smits kaj Sophia Mensen (Sofino).

El 27 ĉeestantaj voĉdonantoj: por – 27.

4. Estis demandoj direktitaj al novaj estraranoj, ekzemple, kiel Jung Yuro (Unika) sukcesos kombini plenumadon de siaj novaj taskoj kiel estrarano kun la studado en UAM Poznan. Unika respondis, ke ŝi estas adaptema kaj kun helpo de spertaj estraranoj ŝi sukcesos venki ĉiujn malfacilaĵojn.

Estis faritaj jenaj proponoj/konsiloj al novaj estraranoj:

- Mireille Grosjean proponis al ĉiuj esplori la ILEI retejon por aktualigi kaj renovigi ĝin.
- Stefan MacGill konsilis, ke oni ne atendu taskojn, ili estu pli aktivaj kaj kreemaj.
- Duncan Charters admonis ne retiriĝi pro malfacilaĵoj, ĉar iu solvo ĉiam estas trovebla.
- Mireille Grosjean kaj Aurora Bute parolis pri kreado de reta diskutlisto/novaĵlisto, kiu plifaciligos komunikadon kaj mastrumadon.

Parolis Marija Belošević kaj estis pridiskutitaj jenaj demandoj:

- Malapero de Gimnazio de ILEI
- Interna regularo
- La revuoj IPR kaj Juna Amiko
- Fondaĵoj kaj subvencioj
- ILEI kaj KER ekzamenoj

- Komisionoj

Mireille Grosjean parolis pri la neceso kreskigi la membraron kaj starigi laborgrupon, kiu okupiĝos pri la enhavo, aspekto, merkatakaj kaj financaj aferoj koncerne la du revuojn.

5. Estis prezentita budĝeto por la jaro 2019 kaj okazis voĉdono por ĝia aprobo.

Por – 25

Sindetenoj – 2

La budĝeto estis aprobita.

=====

Protokolis: Jérémie Sabiyumva, Karine Arakeljan

Reviziis: Elena Nadikova

26.01.2019